

ESPERANTO

TRIUMFONTO

Nova titolo post 1 januaro 1925: „Heroldo de Esperanto“.

Aperas dufoje en la semajno (merkrede kaj sabate). — Prezo de unuopa numero 0.20 sv. fk. aŭ egavaloro.

Protektantoj:

D-o Leono Zamenhof, Warszawa
W.M. Page, advokato, Edinburgh
Ernest Archdeacon, Paris
J. Olli Norta, komercisto,
Barcelona

H. Fischer, grandindustriisto,
București
Frans Schoofs, Antwerpen
P. v. Medem, bank- kaj fabrikk-
direktoro, Kaunas.

N-o 223
10. 12. 1924

Redakcio:

Cefredaktoro: Teo Jung.

Redakciaj kunlaborantoj:
H. Jung kaj M. Butlin, L. K.

Administracio:

Horrem b. Köln, Germanlando

Abonprezo ponomera
de duonsemajna ekspedado: eg-
valoro de 0.20 sv. fk., mendita per
loka poŝtoficio 0.15 sv. fk.;
de semajna ekspedado (du numeroj
kune): 0.15 sv. fk.

Anonprezo
po unucentimetra kolonero egvaloro
de 2.— sv. fk. (antaŭpage 1.50 sv. fk.),
minimuma alteco 8 cm.

Antwerpen, Barcelona, București, Edinburgh, Horrem, Kaunas, Paris, Warszawa

S-ino Zamenhof mortis.

Lastmomente antaŭ presigo de tiu ĉi numero atingis nin la malĝoja sciigo, ke la fidele kamaradino de nia neforges-ebila Majstro, s-ino Klara Zamenhof, mortis sabaton, la 6 decembro, vespere je 8 h., en la aĝo de 61 jaroj. Laŭ informoj ricevita antaŭ nelonge oni eksciis, ke la vidvino de nia Majstro grave malsanis kaj ke operacio estos neevitebla. Nun ŝi jam ne vivas. La sciigo estas des pli malĝoja, ĉar ĵus la tutmonda esperantistaro preparas sin por festi la 65-an datrevenon de la naskiĝo de la Majstro. La morto de s-ino Zamenhof verŝos amaran guton en la ĝeneralan festoĝojon. Pri la detaloj ni raportos tuj, kiam ni estos ricevinta ilin el Varsovio. Al la funebraj antaŭfamilianoj ni esprimas la senton de nia profunda kondolenco. Estu por ili iom da konsolo, ke kun ili funebros la tuta esperantistaro.

T. J.

Akademio.

Cirkulero al la L. K.-anoj.

Parizo, la 21-an de novembro 1924.
Kara kolego,

kiam fine la Akademio kaj la Lingva Komitato estas plene reorganizitaj, ŝajnas saĝe starigi nun, laŭ ĉap. X de nia Regularo, la nacilingvajn subkomitatojn.

Ilia ĉefa tasko estos ekzameni atente la verkojn — precipe la lernolibrojn kaj vortarojn — aperintajn en ilia lando. La rimarkojn, kiuj rezultos de tiu ĉi esploro, ekzemple: pri novaj radikoj, ĉu (laŭ ilia opinio) aprobindaj, ĉu forjetindaj, pri gramatikaj neologismoj, ktp., ili sendu samtempe al la Akademio kaj al la aŭtoro de la verko.

Kiam, por ĉiu lingvo, sufiĉe nombraj estas la samnaciaj Lingva-Komitatoj, tiuj ĉi elektu inter si unu prezidanton kaj unu sekretariojn, kiuj oficiale korespondos kun la Akademio.

Bonvolu do tuj, kiam tio estos al vi ebla, konigi al la Prezidanto de la Akademio la nomojn de la elektitaj prezidanto kaj sekretario por ke li povu publikigi ilin en la Jarlibro 1925.

Bedaŭrinda fakto estas, ke kelkaj gazetoj tute ne sendas siajn kalendarojn aŭ numerojn; ke multaj esperantistoj, eĉ Lingva Komitatoj, tute ne sendas siajn verkojn al la Akademio, eĉ ne al la Prezidanto kaj al la fakaj Direktoroj. Malgraŭ sia bonvolo, sufiĉe riĉaj tiuj ĉi ne estas por abonon ĉiujn gazetojn kaj aĉeti ĉiujn aperintajn librojn. Tamen por ilia laboro tre necese estas, ke ili estu regule kaj plene informitaj pri ĉio, kio rilatas al la lingvo kaj al ĝia progreso kaj evoluado.

Vi rajtas postuli de la Akademio, ke ĝi laboru, sed viaflanke helpu al ĝi laŭpove en amika spirito!

Via tre sindona

Th. Carr,

Prezidanto de la Lingva Komitato

kaj de ĝia Akademio.

Rilatoj inter la Akademio kaj la Eksterakademia Sekcio por Scienca kaj Teknika Vortaro.

(Prezidanto: Rollet de l'Isle; sekretario: Rousseau.)
Al jena demandaro de la Direktanto de la „Sekcio por Scienca kaj Teknika Vortaro“:

a) Kiamaniere efektivigos la antaŭvidita kontrolo de la Akademio?

b) Ĉu ĝi koncernas la organizadon kaj funkciadon de la Sekcio?

c) Ĉu ĝi koncernas nur la lingvajn demandojn?

d) Ĉu la Akademio intencas esplori la novajn afiksojn kaj vortojn proponatajn antaŭ ol ili estos akceptataj de la Sekcio kiel provizore kaj prove uzataj?

la Prezidanto, je la nomo de la Akademio, respondis:

a) Kontrolo: kiam la „Sekcio por Scienca kaj Teknika Vortaro“ opinios, ke scienca aŭ teknika terminaro estas, post sufiĉe longa provado, tute preta por Akademio oficialigo, tiu Sekcio submetos ĝin al la Akademio, kiu, konstatinte, ke ĝi entenas nenion, kio estas kontraŭa al la lingvo, kiun donis al ni D-o Zamenhof en sia Fundamento, donos al ĝi sian aprobon.

b) Tute ne. Vi estas plene libera organizi vian Sekcion, kiel ŝajnas al vi plej utile kaj praktike, kaj elektu la esperantistojn — L. K.-anojn aŭ ne —, kiujn vi opinios plej kompetentaj en la diversaj fakoj.

c) Jes.

d) Ne. Diskutu, studu, prove uzu afiksojn aŭ vortojn unue inter vi scienculoj.

(Eliraĵo el la ĵus aperinta Jarlibro de la Lingva Komitato kaj de ĝia Akademio [1924—1925] pag. 9.)

Tiuj, kiuj ĉiam riproĉas, ke en Esperanto mankas teknikaj vortaroj, iom tro forgesas la ekziston de tiu ĉi grava teknika verko:

Verax: „Enciklopedia Vortarejo“, al kiu, inter aliaj

oni povas aldoni:

Verax: „Vocabulaire Technique français-espéranto“;

Rousseau: „Polyglotta Vade-mecum de internacia farma-

cio“;

Rollet de l'Isle: „Provo de marista terminaro“.

(Ĉiuj kvar ĉe Esperantista Centra Librejo, 51, Rue de Cligny, Paris 9) kaj:

Wüster: „Enciklopedia Vortaro; I-a parto (ĉe: Hirt & Sohn, Leipzig) ktp.

K. R.

Konstanta Reprezentantaro de la Naciaj Societoj

konsistanta el unu reprezentanto de ĉiu nacia societo esperantista.

(Starigita laŭ decido de la XIV-a Universala Kongreso de Esperanto, Helsinki 1922).

Honorprez.: Prez.: s-o John Merchant, (Sheffield, Anglujo).

Sekr.-Kas.: s-o Charles H. Edmonds.

Sidejo ĉe la Sekretario-Kasisto:

21 Russellcroft Road,

Welwyn Garden City, Anglujo.

Al la Prezidanto de la Nacia Societo Esperantista.

Estimata Samideano!

Kvina Cirkulero.

La kvinan fojon ni havas la devon kaj plezuron nin turni al la naciaj societoj reprezentataj en Konstanta Reprezentantaro pri komunal aferoj, kaj ni nun forte sentas, ke K. R. staras sur firma bazo kaj ke ĝi efektive reprezentas la deziron de la organizita movado.

Raporto al Viena Kongreso kaj Protokolo de kunvenoj de K. R. dum la Kongreso.

17. Ni ĉi kune sendas al vi ekzempleron de nia Raporto pri K. R. al la XVI-a Kongreso en Vieno kune kun la Protokolo de kunvenoj de K. R. dum la Kongreso. Tiuj dokumentoj jam aperis en „Esperanto“ por oktobro 1924. Ili estas represitaj en la Oficiala Raporto pri la Kongreso eldonita de la Centra Komitato.

Financo por 1923.

18. Rilatas al 4. Per la raporto al la Viena Kongreso vi rimarkos ke la neta enspezo de K. R. por la jaro 1923 ĝis la Viena Kongreso

Nominalo en sv. fk.

estis 65.8.8 1650.23

Post la Kongreso, la sekr.-kasisto ricevis du pluajn sumojn por la jaro 1923,

nome:

Belga Ligo Esp. b. fk. 100.— 1.1.7 27.21

Norvega Esp. Ligo n. kr. 50.— 1.1.4 39.51

Entute 68.1.7 Sv.fk. 1716.95

Tiun sumon de £ 68.1.7 la sekr.-kasisto de K. R. jam transdonis al s-o Page, kasisto de Centra Komitato, kaj ricevis por ĝi kvitancon.

Financo por 1924:

19. Laŭ promeso en nia raporto al la Viena Kongreso la sekr.-kasisto raportis buŝe al kunveno de K. R. en tiu Kongreso pri la sumoj pagitaj por 1924. La ĝisdata listo estas la jena:

Societo	Mem- broj	Voĉoj	Sumo	Tenata en brita mono	Nominalo en sv. fk.
Kataluna E. F.	500	250	150 pes.	£ 4.14. 4	118.95
Germana E. A.	2500	692	625 fr. fk.	7.15. 6	196.09
Japana E. I.	2282	400	665.60 fr. fk.	7.15.11	196.61
Riga E. S.	100	100	30 latoj	1. 6. 8	55.65
Litova E. A.	51	51	51 lid.	1. 5. 2	29.21
C. Dana E. L.	200	20	100 d. kr.	5.15. 0	94.57
Norvega E. L.	100	100	50 n. kr.	1.11. 6	39.72
Nederlanda S.	300	300	75 ned fl.	6. 9. 4	165.09
Svisa E. S.	350	200	100 sv. fk.	4. 2. 6	104.05
Brita E. A.	1200	1200	30.00	30. 0. 0	756.68
G. E. L. en Ĉeĥo- slovakio	700	550	700 ĉ. kr.	4. 7. 6	110.54
Polva E. A.	?	80	20 zlot.	16. 1	20.28
Itala E. F.	?	150	180 lir.	1.15. 4	42.05
Rumana E. S.	220	220	10 dol.	2. 2.10	54.01
Brazila L. E.	250	250	250 fr. fr.	2.16. 5	71.12
Hungarlanda E. S.	200	100	15 s. fk.	1. 0. 6	25.85
			2.50 ned fl.	1 us.dol.	
Aŭstruja E. D.	?	?	£ 2.0.0	2. 0. 0	50.44
Ĉeĥoslovaka E. S.	500	250	500 ĉ. kr.	5. 2. 6	78.81
S. Franca P. E.	1056	528	528 fr. fk.	6. 3. 6	156.75
Belga L. E.	400	200	200 b. fk.	2. 3. 5	54.54
				sv.	
				£ 94.19.10	fr 2395.65

Kelkaj societoj avertis, ke ilia budĝeto jam estis farita antaŭ la Geneva Konferenco, kaj tial por la jaro 1924 ili ne povas pagi laŭ la tie starigita bazo. Ili tion promesas, tamen, por 1925.

Oni rimarkos, ke la entia sumo ricevita por 1924 jam estas multe pli granda ol tiu ricevita por 1923. Pri tiu fakto ni tie kore gratulas la naciajn societojn, kiuj per tio montris sian deziron forte kaj lojale subteni la novan organizon de la movado kaj ebligis la efikan funkciadon de la internaciaj institucioj.

Ŝango en la Kontrakto de Helsinki.

20. Rilatas al 15 kaj 12. Per la protokolo de vienaj kunvenoj de K. R. vi sciigos, ke la naciaj societoj per voĉdono akceptis la proponitan ŝangon en Artikolo 4 de la Kontrakto de Helsinki. Ni ricevis post la Kongreso aproban voĉdonon de Kalifornia E. A., Norvega L. E., Japana E. I., kaj ankaŭ de S. Franca P. E., kies delegito en Vieno sin detenis de voĉdono pro manko de instrukcioj. La ŝango, do, fariĝis definitiva kaj unuanima, ĉar ne nur la naciaj societoj sed ankaŭ UEA sciigis sian akcepton de la ŝango al Centra Komitato.

Adreso por cirkuleroj de K. R.

21. Ĝis nun, krom laŭ speciala peto, ni sendis la cirkulerojn de K. R. al la prezidantoj de la naciaj societoj, kiel ni faras je la nuna okazo. Laŭ la decido de K. R. en Vieno, la naciaj societoj devos nun elekti reprezentanton, kies adreso valoras en ĉiu okazo. Ni petas, ke vi sciigu al ni la adreson de via reprezentanto por estontaj cirkuleroj ktp. sur la ĉi kune respondilo.

Eksigo de s-o Chavet el Centra Komitato.

22. Laŭ anonco en la Viena Kongreso, s-o Chavet pro profesiaj kaŭzoj devis ekŝigi el la Centra Komitato. K. R. esprimis sian koran bedaŭron pri tiu ekŝigo, ĉar s-o Chavet multon faris por la movado antaŭ la milito. La kunveno de K. R. en Vieno proponis per skriba voĉdono la nomon de s-o Rollet de l'Isle por la ofico de s-o Chavet, kaj ni petas, ke via societo afable voĉdonu sur la respondilo ĉi kune sendata.

Interna Regularo de K. R.

23. Laŭ decido de kunveno de K. R. en Vieno, la estraro nun preparas projekton de Regularo de K. R. (kiun ĝi mem devas fari laŭ la Kontrakto de Helsinki). En Vieno la delegitaj donis ideojn al la estraro, kiuj estas resumataj en la protokolo. Se via societo deziras proponi pluajn ideojn, bonvole sendu ilin senprokraste al ni, por ke ni prilaktu ilin.

Estonta sistemo de pagoj al K. R.

24. La Konferenco de K. R. en Genève je Pasko rekomendis, ke la naciaj societoj studu la demandojn pri estonta pli definitiva pagsistemo al K. R., kaj tiujn demandojn oni iomete pritraktis en Vieno. Por ke K. R. faru finan decidon pri tiu temo, estas dezirinde, ke ĉiu nacia societo sendu koncizan resumon de siaj opinioj al ni. Ni poste dissendos ĉiujn opiniojn al ĉiu nacia societo, por ke en kunveno poste oni faru decidon.

Estas dezirinde, ke la demando estu fine solvata en la printempo de 1925, kaj ni tial petas, ke vi plenumu la deziron kiel eble plej frue. Ĉis nun nur la estona societo sendis tian resumon.

Dissendo de jaraj raportoj.

25. La Geneva Konferenco ankaŭ rekomendis, ke ĉiu nacia societo sendu al la estraro de K. R. esperantan resumon de sia jara raporto. Ĉiu societo, kiu sendas tian resumon, ricevos la resumojn ricevitaĵoj de aliaj societoj. Por helpi al ni, estas dezirinde, ke vi sendu sufiĉan provizon, ni diru 50 ekzemplerojn. Tamen, se estas neeble al vi tion fari, sendu la resumon (kun financa raporto, se eble) kaj ni faros la multobligon Tia intersaĝo de raportoj, rerekomendata en Vieno, povus multe helpi per provizado de ideoj unu al la alia.

Internacia Eksperimento pri Instruo de Esperanto al Komercestoj diverslandaj.

26. Por doni sekvon al la deziro de la Venecia Komercia Konferenco, la poste starigita organizaĵo, Brita Komitato por Internacia Komercia Lingvo, dissendis al la samideanoj komisiitajn en Genève por prizorgi tiun taskon cirkuleron de instrukcioj pri ĉi tiu grava eksperimento. Por via informo, ni sendas ĉi kune kopion de la instrukcioj. Ne estas necese, ke oni starigu aregon da kursoj, sed estas tre dezirinde, ke la komisiitaj samideanoj urĝe prizorgu tiun aferon, kaj ni tial petas, ke via societo interrilatiĝu kun la komisiito en via lando por certigi pri la sukceso de lia laboro. Se ne troviĝas komisiito en via lando, kaj vi vidas eblecon starigi unu bonan kurson sub ekstera kontrolanta organizaĵo, bonvole klopodadu pri tio kaj sciigu al s-o Edmonds pri viaj feroj. Ni ankaŭ petas, ke vi helpu rilate al starigotaj kaso por ebligi pagitan vojaĝon al la venonta Komercia Konferenco en Parizo por la plej bona lerninto en ĉiu kurso.

Saĝo de nomo de la Centra Komitato.

Laŭ propono de UEA la naciaj societoj estas petataj esprimi sian opinion pri peto, ke la Centra Komitato ŝanĝu sian titolon je „Internacia Komitato“ aŭ je „Internacia Centra Komitato“, ĉar diversaj societoj plendas, ke la naciaj societoj ĉiam parolas pri sia propra „Centra Komitato“ kaj tio naskas bedaŭrindajn konfuzojn. Bonvole esprimu la preferon de via societo sur la ĉi kune respondilo.

Rezolucio pri Esperanto kiel klara lingvo por telegrafado akceptita de la Ligo de Nacioj.

28. Ni ĉiuj tre kore gratulas kaj dankas al D-o Privat por la nova sukceso de la Ligo de Nacioj, kiu malfermas multajn pordojn. Por ke la gravaj rezultoj haveblaj el tiu akcepto ne estu perdataj por la movado, estas dezirinde, ke ĉiu nacia societo klopodu apud sia registaro.

En kelkaj landoj Esperanto jam estas akceptita kiel „klara lingvo“ por enlandaj telegramoj. Se en via lando tiu rekonio ĝis nun mankas, nepre petu vian nacian telegrafan direkcion akcepti la lingvon, kiel jam faris aliaj, uzante kiel ilon la rezolucion de la Ligo de Nacioj.

Plue estas dezirinde atentiĝi vian nacian telegrafan direkcion pri la rezolucio de la Ligo de Nacioj kaj peti, ke la direkcion proponu al la Universala Telegrafa Unio en Bern, ke ĝi enmetu tiun rezolucion en la tagordon de la telegrafa kongreso okazonta en Parizo dum la printempo, kun la celo aldoni la vorton „Esperanto“ en la regularo de la Universala Telegrafa Unio, kiu antaŭvidas la rekonatajn lingvojn (ĝis nun ĉiuj naciaj kaj la latina). Bonvole sciigu al D-o Privat pri la rezultoj de viaj klopodoj.

Gravaj venontaj Konferencoj.

Radio Konferenco en Parizo je Pasko 1925.

29. En Parizo dum venonta Pasko okazos la unua Konferenco de la Internacia Amatora Radio Unio, kaj ĝin ĉeestos oficialaj delegitoj de eble ĉiuj naciaj radio-societoj en la mondo. Ĝi efektive estos kvazaŭ la internacia parlamento de amatora radio. Unu el la plej gravaj temoj diskutotaj estas internacia lingvo por radio. Felice por ni, la Honora Sekretario de la Konferenco estas nia samideano, D-o Pierre Corret.

Jam la Amerika Radio Relaja Ligo decidis subteni Esperanton, kaj eble aliaj landoj ankaŭ subtenos.

Car kredible Esperanto estos permesata de la Konferenco kiel unu el la lingvoj uzataj, estas necese, ke kion eble plej multaj esperantistoj ĉeestu la Konferencon, por montri, ke ĝi estas ne nur uzbla lingvo, sed ankaŭ uzata.

Tre verŝajne, nur oficialaj delegitoj de naciaj radio-societoj povos voĉdoni (eble aliaj povos nur paroli) kaj tial estas necese ke, kie ajn estas eble, esperantistoj estu sendataj kiel oficialaj delegitoj. En la malgrandaj landoj, precipe, kaj en

landoj, kie la radio-movado ankoraŭ ne ĝis nun prosperas, la naciaj radio-societoj ne povos ŝpari monon por sendi oficialan delegiton por ilin reprezenti. En tiaj landoj, esperantistoj, prefere kun scio pri radio, povos sin proponi kaj, se ili estas pretaj pagi la proprajn elspezojn, la naciaj radio-societoj eble akceptos ilin, tiel donante al ni pluajn voĉojn en la Konferenco.

Pri tiu afero, oni sin turnu al la nacia sekretario de Internacia Radio-Asocio, se tia ekzistas por la lando. Samideanoj, kiuj intencas ĉeesti la Konferencon, eĉ en privata rolo, bonvole sciigu al s-o Epton, Ĝenerala Sekretario de I. R. A., 17 Chatsworth Road, London, E. 5., Anglujo.

Komerca Konferenco en Parizo,

15 majo 1925.

30. Ni ricevis de D-o Privat, Prez. de Centra Komitato, la ĝojan sciigon, ke la Pariza Komercia Ĉambro akceptis patroni Komercan Konferencon en Parizo, dum la Foiro, je 15 majo, por akcepti la raportojn pri la Internacia Eksperimento kip. Pri tiu Konferenco ni denove sciigos vin pli poste.

Proksima kunveno de K. R.

31. Ni ankaŭ vin sciigas, ke ni oficiale akceptis kunvoki K. R. en Parizo dum la Komercia Konferenco. La tagordo pritraktos, inter aliaj aferoj, la Internan Regularon de K. R., kun la demando pri pagsistemo, kaj krome, la tre gravan komunan demandojn — Teknikaj Vortaroj (15—17 majo).

* * *

Permesu al ni esprimi nian ĝojon, ke la naciaj societoj, eĉ kontraŭ multaj malfacilaĵoj, plene montris sian pretecon subteni la internaciajn instituciojn de la esperanta movado. Ni deziras al via laboro ĉiun sukceson, kiun ĝi meritas, kaj certigas vin pri nia konvinkigo ke per kuna agado ni povas sentime paŝi al la fina triumfo de nia afero.

Tre kore vin salutas

John Merchant, prezidanto.
Charles H. Edmonds, sekr.-kasisto.

Brita Komitato por Internacia Komercia Lingvo.

Sekretariejo: 21 Russellcroft Road,
Welwyn Garden City,
Anglujo

9 novembro 1924.

Internacia eksperimento pri la instruo de Esperanto al komercistoj diverslandaj.

La Komercia Konferenco en Venecia dum aprilo 1925 petis la britan delegitaron, organizi internacian eksperimenton pri la instruo de Esperanto al komercistoj diverslandaj.

Sekve de la konferenco, la brita delegitaro sukcesis fondi komunan komitaton de britaj komercialaj organizaĵoj kaj komercistoj.

Tiu komuna komitato sub nomo Brita Komitato por Internacia Komercia Lingvo konsistas el: Komitato pri Komercia Instruado de Londona Ĉambro (s-o Charles H. Edmonds), Edinburgh Merchant Company (s-o Andrew Wilson C.E.), Ĉambro de Komercio de Haslings (s-o J. I. Boulwood J. P.), Ĉambro de Komercio de Burnley (s-o W. B. Currie), s-o John Merchant, reprezentanto de Venecia de Ĉambro de Komercio de Sheffield, s-o J. T. Holmes, reprezentanto de Venecia de Ĉambro de Komercio de Bradford.

Por atingi la plej taŭgan efektivecon de la deziro de la Venecia Konferenco rilate al la internacia eksperimento, la komitato petis la konsilion de konferenco de Universala Esperanto-Asocio kun la naciaj societoj esperantistaj okazinta je Pasko 1924 en Genève.

Tiu konferenco, pristudinte la aferon, unuanime alprenis la jenan decidon:

Oni starigu kursojn de ne pli ol 20 lernantoj por daŭro de ĉirkaŭe 3 monatoj kun fiksa nombro de 25 lecionoj unuhoraj.

(Noto: Oni komencu plej malfrue en januaro por fini en marto 1925)

sub kontrolo de Komercia Ĉambro aŭ bone konata gazeto aŭ alia kompetenta neŭtrala institucio.

Pri la starigo de la kursoj, oni kion eble reklamu en la gazetoj, unue por havigi lernantojn kaj due por alvoki la atenton de la publiko al la eksperimento.

La lernantoj se eble estu komercistoj diversspecaj.

Post la instrua periodo de tri monatoj la kursanoj diverslandaj interrilatiĝu unu kun alia pri komercaj aferoj por provi la efikecon de sia scio pri la lingvo kaj de ĝia taŭgeco por komercaj celoj.

La ateston de la kursanoj tiurilate oni kiel eble plej vaste dissendu por konvinki komercistojn pri la utileco de Esperanto.

La jenaj delegitoj akceptis preni sin arangan de tia eksperimento en sia lando aŭ urbo kaj interkorespondi kun s-o Edmonds pri la detaloj:

Alfredo Stromboli, Lungarno Regio 17, Pisa
Umberto Toschi, Viale Gozzadini 7, Bologna
Salo Grenkamp-Kornfeld, turisto, Jaslo
Georges Delanoue, 4 rue Ch. Divry, Paris 14
Jean Couteaux, Av. du Clocher 5, Aulnay sous Bois
J. R. G. Isbrlicker, v. Bevernigstr. 10, s-Gravenhage
Friedr. Ellersiek, Wilmsstr. 5, Berlin SW 61
Gustav Scholze, Klothildenstr. 6-11, Reichenberg
Augustin Pitlik, Kremencova 17, Praha 2
R. Hromada, 555 Sochanska, Praha 7
Paulo Balkanyi, Hajos utca 18-11, Budapest
Franz Schade, Mollardgasse 55, Wien 7
Charles H. Edmonds, 21 Russellcroft Road, Welwyn Garden City

Pierre Bovet, 14 Ch. Sautter, Genève
Robert Kreuz, antaŭe en Horrem b. Kbln.

En la nomo de la Brita Komitato por Internacia Komercia Lingvo, ni nun skribas al la nomitaj sinjoroj, petante ilin efektiviĝi la planon.

Estimatej samideanoj!

La jenaj instrukcioj vin helpos rilate al la laboro farota:

1. Estas unue necese, ke vi decidu, sub kies kontrolo via kurso okazu. Vi povos peti vian komercan ĉambro aŭ bone konatan gazeton en via urbo agadi en ĉiu lando. Se necese estas, ke nia Komitato sin turnu al via komerca ĉambro aŭ gazeto por ĝin favorigi, bonvole skribu al mi tion petante, kaj klare indiku ĝuste kion vi deziras, ke mi faru kaj diru.

Por ŝpari tempon, bonvole mem aranĝu la aferon senpere, se eble. Tamen, se estas necese, ke mi skribu al indikota organizaĵo, mi tion faros tuj post via skribo.

2. Fiksu kunvenojn, tagon, horon, instruiston, instruoplanon, komendaton, por via kurso. Laŭ konsilo de la konferenco en Genève la kurso havu daŭron de 25 lecionoj unuhoraj, ĝis fino de marto 1925.

3. Kiam vi plene fiksis la detalojn pri via kurso, reklamu en la gazetoj pri ĝi, petante komercistojn aliĝi al ĝi por partopreni en la eksperimento. Elektu el la respondoj ne pli ol dudek lernantoj el diversaj sferoj de la komercio — kaj komencu vian instruadon.

4. Estas dezirinde, ke la reprezentanto de la kontrolanta organizaĵo mem ĉeestu dum la instruado.

5. Per taŭgaj sciigoj al la gazetoj por presigo en la gazetoj altiru la atenton de la publiko.

6. Nepre sciigu al mi pri la efektiveco de via kurso kaj je la komenco de februaro sendu al mi liston kun nomo kaj adreso de ĉiuj lernintoj. Kolektinte la adresojn de ĉiuj lernintoj en la diversaj kursoj, mi sendos al ĉiu la nomon kaj adreson de alia lerninto por reciproka interkorespondado.

7. Poste estos necese havigi atestejon en taŭga formo de la lernintoj kaj de la kontrolintaj organizaĵoj por prezenti ilin al Komercia Konferenco en Paris kunvokota de la Pariza Ĉambro de Komercio. Pri tiuj atestej mi povas konsili vin pli poste. Vi kaj ni klopodu kolekti monon por fondi konkurson kaj sendi al Paris la plej bonan lernanton kun pagita vojaĝo.

Ĉi tiuj lernantoj mi ankaŭ sendas al la jenaj kelkaj personoj, kiuj esprimis deziron starigi kursojn:

s-o J. D. Applebaum, 11 Mayville Road, Mossley Hill, Liverpool

s-o Paul Glöckner, Gartenstr. 32, Pirna a. E.

s-o J. Schmid, Muslinweg 2, Bern

s-o E. Müller, Rotstrasse 55, Zürich 6.

Kopion de la letero mi sendos por informo al la naciaj societoj esperantistaj post kelkaj tagoj.

Nu, karaĵ sinjoroj, mi petegas vian tujan klopodadon por sukcesigi la eksperimenton, kaj dezirante al ĉiu via peno la plej grandan sukceson, mi atendas vian sciigon.

Kun plej koraĵ bondeziro kaj salutoj

por Brita Komitato por Internacia Komercia Lingvo

(subskribita) Charles H. Edmonds.

Hon.-Sekretario.

Internacia Konferenco por la uzado de Esperanto en sciencaj kaj teknikaj rondoj.

La Scienca Asocio Esperantista de nun organizas Internacian Konferencon, kies celo estas traseri la diversajn rimedojn taŭgajn por efektiviĝi la deziresprimon de diversaj personoj kaj francaj societoj sciencaj kaj teknikaj, kiuj sin montris favoraj al pli plena uzado de Esperanto en siaj rondoj.

Tiu Konferenco okazos en Paris, majo 1925.

La scienculoj kaj la teknikistoj ĉiulandaj, kiuj jam aprobis la uzadon de Esperanto, estos invititaj; plie la sciencaj kaj teknikaj societoj diversaj, kiuj jam montris ian intereson pri la lingvo, aŭ kiujn ni esperas konvinki per konstato de faktoj, estos petataj, ĉi tiu sendi delegitojn.

La programo estos jena:

1. Raportoj pri la agado de Scienca Asocio kaj aliaj teknikaj esperantistaj societoj depost 1906, por konigi kaj disvastigi la uzon de Esperanto; rezultato de liaj klopodoj.

2. Komuna studado de la rimedoj konsilataj de la Asocio por intensigi ĝian agadon: decidoj alprenotaj de la oficialaj diversnaciulaj estraroj por la instruado de nia lingvo, kaj por plifaciligi ĝian uzadon al scienculoj kaj teknikistoj — metodoj rekomendindaj por la verkado de esperantaj teknikaj vokalarioj — fondo de daŭra organismo komisiota por realigi la decidojn de la konferenco kaj instigi bonajn rezultojn. — Publikigado de perioda Scienca Revuo en Esperanto. — Eventuala partopreno de la internacia intelekta kooperado — ktp. . . .

La aliĝo al tiu konferenco estas senpaga; sed la organiza komitato plej danke ricevos mondonacojn, ĉu grandajn ĉu malgrandajn.

De la organiza komitato estas honorprezidanto s-o ĝeneralo Sebert, ano de Franca Scienca Akademio. — La prezidanto estas s-o Rollet de l'Isle, ĝenerala Hidrografa Inĝeniero de la Franca Maristaro.

Eĥoj el Paris.

Ĉiulandaj samideanoj konas la nomon de Prof. Carlo Bourlet kiel vigla propagandisto kaj gvidanto de nia movado bedaŭrinde tiel frue malaperinta. Sed li estis ankaŭ delikata poeto kaj tradukis interalie en 1909 libere, laŭ la fama franca poeto Jean Richepin, membro de la Franca Akademio, la poemon „Paris“, tre malmulte konatan:

Memoru mia koro, memoru pri Parizo,

Pri pasigitaj tagoj en tiu paradizo.

Pri Seine'a verda brilo en sun subira luno,

Pri kanto de l' urbejo, pri tiu milda zumb,

Pli milda ol la kanto de l' birdoj de la maro.

Vespere tiu voĉo murmuris en domaro,

Ruliĝas en aero vibranta de homspiroj.

Ĝi estas de la kisoj, deziroj kaj spiroj

Ardanta kunfluo, loganta simfonio.

Melankolia bruo, kaplanta harmonio.

En tiu Paris okazos la proksiman jaron internaciaj sciencaj kaj komercaj esperantaj konferencoj kaj, krom tio, kunveno de la delegitoj de esperantaj institucioj. Ni ne parolas hodiaŭ pri Paris kiel urbo, tio estos eble temo de alia artikolo.

Sed, en la historio de nia movado, Paris estas scenejo de la heroo pratempe de nia movado, kiam vere oni bezonis sindonemon, kuragajn, konvinkajn, persistajn kaj ageman por batali por Esperanto. Ĉu nia nova generacio rememoras pri la unuaj paŝoj de la Societo por la Propagando de Esperanto fondita en 1898 (al kiu titolo oni poste aldonis „Franca“), pri la komunikado farita 1898 en la Franca Scienca Akademio de Ĝeneralo Sebert, la respektinda Nestoro de nia movado kaj la ĝeneva filozofo Naville, pri fondo

de la Pariza Grupo? En 1901 venas al nia movado scienculoj, kiel matematikistoj Meray kaj Bourlet, filozofo Boirac, lingvisto Cart; poste la konata libro Hachette, dank' al Bourlet, fariĝis esperanta eldonejo. Oni devas ankaŭ esti veterano por rememori pri la Boulogne-a Kongreso de 1905, pri la akcepto de Zamenhof en Paris kaj la honoroj faritaj al li.

La movado vigle progresis ĝis la milito kaj poste, en la terura tumulto, malaperis multaj fervoraj samideanoj. Malplenoj aperis en niaj vicoj kaj, post la fino de la milito, kiam la franca samideanaro staris antaŭ nova situacio, mankis iom da organizo kaj novaj fortoj. Sed la laboro daŭras kaj la konata decido de la Parisa Komercambro de 9 februaro 1920 estas grava rezultato. Sed la sekvantaj jaron Ministro de Publika Instruado jetis anatemon kontraŭ nia movado. Denove komenciĝis la malfacilaj tempoj, baroj, embuskoj, kontraŭbatalado.

Sed la situacio ŝanĝas kaj la ministroj foriras. Nun estas denove libera kampo por nia movado. La franca nacia societo reorganizigis, federaciis starigis ĉie, grupoj revekiĝis, skeptikigitaj samideanoj retrovis entuziasmon. Nun la S.F.P.E. enhavas en sia honora komitato politikulojn de ĉiuj opinioj, scienculojn kaj profesorojn.

La proksiman jaron okazos en Paris faktoj, kiuj eble donos novan disvolvon kaj etendiĝon al nia movado en Francujo. Ili havos certe ankaŭ postsekvon eksterlande. Jam de nun ni laboru, ĉiu en sia lando, por ke ĉi tiuj konferencoj (el kiu la Komercambro estas sub la protekto de la Parisa Komercambro) sukcesu.

Alo.

Aktuala politiko.



Zaglul Paŝa,
la demisiita egipta ĉefministro.

Antaŭ nelonge egiptaj naciistoj atence mortigis la „sirdar'on“ (ĉefon) de la egipta armeo, s-on Leo Stack. La brita registaro transdonigis al la egipta registaro, per sia supera komisarulo Lordo Allenby, du notojn kun akraj pentokondiĉoj. La egipta registaro malakceptis la respondecon pri la mortigo sed estis preta pagi punon de duona miliono da sterlinoj. La brita registaro ne kontentigis per tio, kaj la egipta registaro de Zaglul Paŝa demisiis. La nova registaro de Zivar Paŝa akceptis la britajn kondiĉojn. La egipta Parlamento kaj Senato direktis protestojn al la parlamento de ĉiuj nacioj kaj al la Ligo de Nacioj.

Aerveturado.

Ekperimentoj de la aerŝipo L. Z. 126.

Elĉerpaĵo el artikolo de K. Beuerle,
Friedrichshafen.

Post kiam la ekscitiĝo kaŭzita per la veturado al Ameriko trankviliĝis, ni iom okupu nin pri la aerŝipo L. Z. 126 mem, kaj pri ĝiaj provaj veturadoj. La sciigoj pri ĉi tiu veturado tekstis kiel formo: Dum la veturado estas faritaj ekperimentoj. Ĉi tiujn ni jen poste iom detale rigardu:

Grava ekperimento estas la konstato de la dinamika suprenirpovo de la ŝipo per ĉiuj kaj per unuopaj motoroj. La scio de ĉi tiuj fortoj ebligas al la kondukanto dum longaj veturadoj sen gasperdo aŭ elbalastigo egaligi grandajn temperaturajn diferencojn, kiujn kaŭzas la tag-nokta ŝanĝiĝo. Pro la ĉiuvespera malvarmigo la portkapablo de la ŝipo malmalgrandiĝas. La kondukanto do devus eligi balaston por povi pluenveturi en statika egalpezeo. Kontraŭe ĉe forta surradiado de la suno la proksiman tagon la ŝipo multe malpezigas kaj devus eligi gason. Ĉi tiuj malakordoj statikaj estas dinamike egaligebaj per la kondukanto per tio, ke ili veturigas la ŝipon oblikve. Oni veturigas dum la pezeo de la ŝipo suprenigante la pinton, dum la malpezeo ĝin malsuprenigante. Per la drakeco tiel atingita kelkaj miloj da kilogramoj estas daŭre egaligebaj. Ĉi tiu dinamika prempovo krome ebligas, ke la aerŝipo daŭrigas sian veturadon malgraŭ difektiĝo de gasĉelo. Dume oni povas rebonigi la ĉelon. Ĉi tiun dinamike suprenirpovon oni mezuras egalpeziginte antaŭe la ŝipon statistike. Oni konstatas la ŝirilitajn nombrojn ĉe ĉiuj motoroj tulpove laborantaj, ĉe diversaj aŭ unuopaj maŝinoj, ĉe diversaj turniĝoj, ĉe diversaj klincaj anguloj de la ŝipkorpo. Ĉe ĉi tiuj mezuradoj samtempe la superpremaj klajoj de la ĉeloj estas ekzamenataj pri ĝusta funkciado.

Kun la mezurado de la suprenirpovo estas kunligata la mezurado de la allasebla plej granda mallevegiĝrapideco de la ŝipo. La scio de ĉi tiu ankaŭ estas grava por la kondukanto, por ke li sciu, per kiu rapideco li povas profunden veturigi ne endanĝerigante la ŝipkorpon. Ĉe kruta malsuprenigo de la ŝipo la portanta gaso multe kunfiriĝas. Sekve, se nesufiĉe rapide aero eniĝas en la ŝipinterajon, ekestas danĝero, ke la ekstera superpremo disrompas la ŝipan ostaron.

Kiel kroma provo estas menciinda la sinorientado (birado) per radiotelegrafajoj. Ĉi tiuj ekperimentoj faritaj dum ĉiu prova veturado estas inter la plej necesaj por la ŝipdirektado. Ĝuste por la veturadoj super maro, nebulo aŭ krome malklara regiono la sinorientado per radiotelegrafajoj estas eble la ununura ilo por kontroli la troviĝejon de la aerŝipo kaj fiksi ties plueindirekton. Ĉi tiuj sinorientadoj tiom precize estas fareblaj, ke la aerŝipo kelkfoje dum la provaj veturadoj povis esti direktata de Konstanz al Friedrichshafen precize al la aerŝipa haveno nur de el la kovrita, fermita radiotelegrafa kajuto.

Alian ekperimenton por la direktado de la aerŝipo ĉefe super la maro oni faris elprovanco signalbombojn. Ĉi tiuj enhavas aerujojn, per kiuj ili fariĝas naĝokapablaj kaj krome specialan ujon enhavantan saketon da fosforkalcio intermiksita kun iom da kalcioakarbuno. La bomboj estas dejetataj el la ŝipo maren. Fosforkalcio havas la econ kontaktante kun akvo ekflamiĝi; ĝi ekstigas helan, malproksimen videblan flamon, kiu krome produktas multan fumon. Teleskopo celante ĉi tiun punkton naĝantan sur la akvo la

kondukanto aŭ la navigacia oficiro de la ŝipo povas konstati la forpeligon de la ŝipo kaj tiel iom elkalkuli forecon kaj direkton de la vento momenta kaj ĝustigi la direkton.

Tutsovetlanda konkurso de senmotora flugado 1924.

La 28 septembro finiĝis trisemajna konkurso de senmotoraj aviadiloj proksime de urbo Feodosia (Krimo).

En tiu konkurso, la dua en Sovetunio, partoprenis 49 aparatoj, inter ili la duono el Moskva. Post teknika kontrolo de firmeco kaj stabileco ĉiuj aparatoj devis fari gliflugon de malalta monteto. Plenuminte la starigitajn kondiĉojn, ili estis allasataj al velflugo de pli alta monto. Alta 200 m, kun krutaj deklivoj, je siaj piedoj larĝan valon (6 km) ĝis Nigra maro, de kiu konstante blovas forta vento, tiu monto prezentas lokon tre taŭgan por velflugo.

Jam unuan tagon piloto Arcenlov superis pasintjaren sovetsandan rekordon (1 h 2 m) kaj flugis per aparato „Ikar“ 1 h 16 m. Piloto Jungmeister kun „Moskviĉ“ levigis 250 m super stariloko, sed pro difektiĝo de gvidilo devis alteriĝi. Sekvintan tagon Jungmeister kun „Moskviĉ“ flugis jam 1258 m. La 22 sept. „Kpir“ el Kiev, gvidata de Jakovĉuk, flugis 4 h 15 m kaj A V F 15 (de Akademio de Aer-Floto n-o 13) eĉ 4 h 30 m. Rekordon starigis Jungmeister per flugdaŭro de 5 h 15 m.

La eksterlandajn rekordojn (Sulc-Germanujo 8 h 42 m, Tore-Francujo 9 h 4 m) la rusaj aviadistoj ne atingis; tamen la sukcesoj de la junaj sovetlandaj flugistoj estas rimarkindaj, precipe se oni atentigas la junecon de l' senmotora flugado en Ruslando.

La ĉiara konkurso riĉigis ĉiujn partoprenantojn je valoraj spertoj kaj tiel multe progresigis la flugarton. Bedaŭrinde tiu progreso devis esti pagata per grandaj oferoj: du aviadistoj pereis pro averio de siaj aparatoj.

H. Frank, Leningrad.

Tekniko.

Supera Teknika Instruado.

Trairante ok landojn kiel studento ĉe Teknikaj Altlernejoj mi detale informiĝis pri supra punkto kaj trovas utile rezumi ĉion al ĝi rilatantan. La Supera Teknika Instruado, i. e. la instruado de inĝeniero, estas tre diversa laŭ la lando, en kiu mi estas. Tamen ekzistas tri tipoj: la germana, la franca kaj la angla tipoj en teknika instruado.

Germanujo. Ekzistas du gradoj de inĝeniero: simpla inĝeniero kaj diploma inĝeniero. Por la preparado de la unua klaso oni havas ŝtatajn kaj ankaŭ privatajn institutojn, por la lasta oni havas ŝtatajn teknikajn universitatojn, nomitajn Teknikaj Altlernejoj. Por fariĝi diploma inĝeniero en Germanujo, oni devas studi sume kaj minimume 16 jarojn. La kondiĉo de eniro en Universitato estas posedo de „abituria atesto“ (12 jaroj). La diferenco de inĝeniero kaj diploma inĝeniero estas ekstreme granda kaj la malplej bonaj estas la tute privataj institutoj.

Francujo. En Francujo oni havas Universitatajn Institutojn por preparo de inĝenieroj aŭ apartajn Teknikajn Altlernejojn. La diferenco inter la diplomoj de la diversaj, plejparte ŝtataj lernejoj estas nerimarkinda. Notoinde estas, ke la institutoj en Francujo instruas pli da matematiko ol en iu alia lando. La daŭro de la studado en Francujo estas oficiale unu jaron malpli ol en Germanujo, sed en praktiko ĝi povas esti eĉ pli longa. Kondiĉo de eniro en universitato estas posedo de „bachelorato“, kiu estas la sama afero kiel la germana abituria ekzameno, sed devas esti farata ĉe la Universitato.

Anglujo. Oni havas multajn specojn de Teknikaj Lernejoj, kiuj tamen ne estas la samaj. En Londono oni havas plurajn municipajn lernejojn, kiuj kvankam bone ekipitaj, ne egalvaloras la francajn aŭ germanajn institutojn. En Londono oni havas la instituton de South Kensington, kiu estas la ĉefa teknika lernejo en Anglujo. Sed la kutimoj kaj reguloj de universitatoj en Anglujo tre diferencas de la kontinentaj universitatoj kaj inter si estas malsimilaj. Povas okazi, ke en la konstruaĵoj de la universitatoj oni eĉ ne aranĝas kolegiojn; por aŭskulti prelegojn oni devas enskribiĝi al faka kolegio, kiu troviĝas en tute alia parto de la urbejo. La daŭro de studado dependas de persona talento, ĉar la eniro al la diversgradaj lernejoj dependas de ekzamenoj.

Al ĉiuj, kiuj sendis al mi kondolenc-esprimojn okaze de l' terura malfeliĉo, trafinta min per la morto de mia neforgesebla patro

Josefo Wiesenfeld

kiu forlasis ĉi mondon merkredo la 26. 11. 24, mi ĉi pere esprimas la plej profundajn kordankojn.

Edvardo Wiesenfeld, L. K.,
gvidanto de l' Pola Instituto de
Esperanto en Varsovio, Biala 5.

Universala Kongreso.

En sia raporto pri la Deksesa nia ĉefredaktoro interalie esprimis la intencan, en sekvantaj n-oj de ET malfermi diskuton pri la temo „Universala Kongreso“, en kiu ĉiu povus priskribi siajn spertojn kaj doni konsilojn, por ke la universalaj kongresoj fariĝu ĉiam pli bonaj, pli perfektaj kaj pli efikaj.

Alvenis diversaj artikoloj pri tiu temo, ĉefe kun plendoj pri aranĝoj de la Deksesa. Sed konsiderante, ke la venontjara kongreso okazos en Genèvo, kie UEA certe zorgos pri taŭga arango, kaj plue konsiderante la kreon de ofico de permanenta kongresa sekretario, pri kio oni parolis en Wien, ni opinias, ke jam estas nebezono, malfermi grandan diskuton pri tiu temo.

Kio pasis, ne estas riparebla. Ni ne plu parolu pri ĝi, sed rigardu la estontecon: logas grandiozaj svisslandaj pejzaĝoj, logas beleaga Genèvo! Tien ni direktu niajn rigardojn, niajn esperojn, niajn dezirojn kaj nian volon! Genèvo — la urbo de nia Dua, kaj denove Genèvo — ja urbo de nia Deksepa!

Socia vivo.

Diferencigo ĉe doganimpостоj favore de la okhora laborotago.

La aŭstra deputitaro, kiu okupiĝis lasttempe pri la preparo de nova dogana tarifo, decidis, laŭ propono de s-o Bauer, rajtigi la registaron pliiĝi je 55 1/2% la importimpostojn por industriaj produktoj venantaj el landoj ne aplikantaj la okhoran laborotagon.

Jen la teksto de la rezolucio balotita de la deputitaro:

La registaro estas rajtigita, per registara ordono kaj kun la konsento de la Ĉefa Komitato de la Deputitaro, pliiĝi je sumo ne superanta unu trionon, la importimpostojn starigitajn de la dogana tarifo, por la industriaj produktoj eksportitaj de ŝtatoj, kiujn ne konfirmis la Washingtona Konvencio de 1919 pri laborhoroj, kaj kies normo pri laborhoroj estas multe malpli alta ol tiu de la dirita Konvencio.

Kulturo.

Aŭstraliaj ĵurnaloj.

Kvankam tre maldense loĝata, Aŭstralio eldonas multajn ĵurnalojn. La ĉefurbo Melbourne havas 144, inkluzive hinan, skandinavan kaj esperantan. En la ŝtato Victoria 146 urboj havas 194 ĝazetojn.

En la plej granda komerca urbo, Sydney, estas ne malpli ol 294, el kiuj 22 estas religiaj (11 diversaj religioj), 6 estas hinaj, 2 grekaj, 1 franca kaj 1 itala. En la cetera parto de la ŝtato New South Wales ekster Sydney, estas eldonataj 246 ĵurnaloj en 171 urboj.

La ŝtata ĉefurbo Brisbane havas 74, Adelaide 52 kaj Perth 46. Eĉ la kompare malgranda insulo Tasmania, en Aŭstralio humore nomata la „Speck“ (i. e. punkteto) havas 30.

Entute la suda kontinento posedas 1260 diversajn eldonaĵojn.

Tiuj faktoj ŝajne montras ke la aŭstralianoj havas pli grandan apetiton por legado ol la ano de New York, kie 8-milona loĝantaro „nur“ produktas 600 ĵurnalojn diversajn.

W. R. W., Torquay.

— Tiuj ĉi tri tipoj validas por multaj landoj. Laŭ mia scio la germana tipo validas ankaŭ por Aŭstrio, Ĉeĥoslovakio, Jugoslavio, Rumanujo, Hungarlando, Svislando kaj Ruslando. La franca tipo validas por Grekujo, Italujo, Hispanujo ktp. La angla tipo validas por ĉiuj anglaj kolonioj, por Aŭstralio kaj Ameriko (Kanado kaj UŜA).

Joŝefo Major, Paris.

Giganta elektra produkto.

En Avon (Ohio), Usono, giganta elektra produkto estos konstruata de Cleveland Electric Illuminating Company.

Tiu produkto kapablos produkti 400 000 ĉevalpovon. Oni diras, ke tio estos la plej grandega en la tuta mondo.

La nova entrepreno kostos 30 000 000 usonajn dolarojn.

W. A. D., Cleveland.

Komunikio.

Ni sciigas ĉiujn interesitajn pri la esperantista studenta movado, ke la sekretariejo de nia asocio troviĝas ĉe Ignacy Koss, Warszawa, Leszno 28 m. 13, kaj samtempe ni informas, ke komunikoj kaj raportoj pri nia agado aperados en „Esperanto Triumfonta“ kaj „Esperanto“.

Internacia Studenta Esperantista Asocio, C. K.

Kroniko.

Por ĉiuj nian legatanojn per ĉiam aktuala, fidinda kaj kompleta informaro, ni bezonas sciigojn (sur poŝtkarto aŭ aparta folieto anuflanke skribita, sed ne inter administrativajn privatajn sciigojn) pri ĉiu novaĵo el la esp. movado. Kondiĉoj: rapide, koncize, fidinde, legeble (precipe nomoj).

Raportoj estu koncizaj. Por hodiaŭa numero ni devas trionigi keikajn raportojn.

Eŭropo.

Germanujo.

Bochum. Grupo „Progreso“ aranĝis la 6. 12. en la salonoj de Parkdomo grandmezuran 14-an fondiĝ-kaj propagandfeston, por kiu ĝi presigis 24-paĝan programon-propagandilon. Ĉeestis centoj da personoj, ĉefe neesperantistoj; gesamideanoj venis de proksime kaj malproksime. Ĉe muziko, seriozaj kaj bonhumoraj paroladoj, liutokantoj, opereto („Ho, tiu fremdulo!“ de Hiller), soldanĉoj kaj komunaj kantoj la vespero rapide forpasis. Sekvinta balo daŭris ĝis mateno. La festo okazigis en bela harmonio kaj varbis multajn novajn amikojn al la grupo. Kunveno: Hotelo Buchumer Hof, angulo Humboldt- kaj Alleeŝtrasse.

Niederoderwitz. Dum decembro komenciĝis nova kurso por komencantoj; gvid. s-o R. Jautze. Ĉiujade la laboras progresantoj por fonde lerni nian lingvon sub gvidado de s-o P. Lätisch.

Italujo.

Udine. La 27. 11. okazis ĵarkunveno de Udina grupo. Oni diskutis diversajn aferojn, i. a. la okazintan inaguradon de la grupa flago. Por la venonta jaro estis elektitaj: Prez. Johano Della Savia, vic-prez. Celeste Giordani, sek. Galliano Dolce, kas. Arturo Romano, membroj: instruisto Mario Cavagna, Gabai Galliano, Franco Monterisi.

Jugoslavio.

Dalmacio.

Komiža. Ne sen efiko restis nia Dua por nia loko. La fliriantaj flagoj sur la ekskurso ŝipo de la kongresanoj sciigis multajn homojn kaj varbis por nia nuna kurso. Gvidas s-o P. Bogdanović.

Meŝković. S-ano Dinko Baselli, prezidinto de Esp. Klubo en Janjina, iniciatis ĉi tie post sia translokiĝo fervoran movadon. La 11. 11. malfermiĝis kurso por improvizita festeto. Paroladon pri signifo de Esperanto faris s-o Prof. Nikola Jerić. Inter la aliaj ĉeestantoj precipe menciindaj estas s-oj V. Jakulić, lerneja inspektoro, kaj J. Glušević, direktoro de burĝa lernejo. La kurso partoprenas: paroĥestro, advokato, 2 instruistoj, 2 poŝtoficiistinoj, fervojoficiisto, 2 komercistoj, entute 25 p.

Sinj. Dank! al s-oj A. Ĉatipović kaj Instr. M. Dominis nia movado progresas. Oni intencas baldaŭ starigi klubon. Split. La ĉirkaŭaĵo entuziasmiĝas por nia lingvo. Tion kaŭzis nia Dua kun ĝiaj belaj ekskursoj. Kursoj gvidataj en Kaŝtel Gomilica de s-o Cortese, en Kaŝtel Kambe-lovac de s-o Zavoreo, en Solin de Roje. Novan kurson por ĝerbanjoj gvidas Coffon (32 p.).

Vis. S-ano A. Borčić, loĝanta en Pospilje, dufoje semajne gvidas kurson en Vis (28 p.) Klubo starigota.

Polujo.

Esperanto en la pola petroldistrikto.

Boryslav. Nia movado bone progresas en pola petroldistrikto. Dum lastaj kvar monatoj grupo de esperantistoj ĉe Ligo de Metalistoj zorgas interesiĝi pri Esp. gravajn personojn laborantajn en laborista movado. Oni aranĝis ekskursojn, sendis delegitojn al konferencoj, partoprenis propagandacele en publikaj aranĝoj, sendis artikolojn al gazetoj ktp. Dum lastaj kvar monatoj estas fermintaj 5 kursoj kun 45 esperantistoj, kaj nun denove estas malfermitaj 4 kursoj por ĵanularoj, virinoj, oficiistoj de „Kasa Chorych“ (kazo por malsanuloj) kaj laboristoj. Konsilantaro de petrolofiscista ligo anoncis kurson. Helpas UEA del. s-o Czechowski. La grupo invitis bulgaron s-on Menkov kiel pagatan instruanton. La 30. 11. boryslavaj grupoj kun UEA-del. vizitis s-anojn en Drohobycz por preparoli kunlaboron en nia distrikto.

(El raporto de s-o R. Wulczek.)

Rumanujo.

Cluj (Transilvanio). Nova kurso kun 18 p. por rumana kaj hungara inteligentularo. Instruas s-o Prof. G. Cornea.

La Komerca kaj Industria Ĉambro disponigas al la Klubo Esp. klubojn kun senpagaj lumigo kaj hejto. Kunveno okazos ĉiudimanche inter 17—22 h. Adreso: Calea Victoriei n-o 51.

Focșani. Je iniciato de s-o Prof. D-o I. Danila komenciĝis kurso tre bone vizitata. Instruas ĉiun dimanĉon s-o M. Wurmbrand el Bukareŝti.

Radauti (Bukovino). Nova kurso por 10 p., gvid. s-o Siegfried Hoerger.

Timișoara. S-o Lukas Balint malfermis kurson kun 40 p. (fervojistoj) ĉe „Leksesed“. La kunveno de ĵanulara Rondo okazas nun dimanche ĉm. je 16 h. en kafejo „Zum Goldenen Hirsch“.

Esperanto en Lernejo.

Germanujo.

Hildburghausen (Germ.). Komenciĝis kurso por 26 lernantoj de la ĉi tiea seminario kaj „Aufbauschule“ (nova speco de allernejo). Gvidanto stud-asesoro W. Hirschberg. Okazis ankaŭ parolado pri Esp. en la popolallernejo, sed tro malmultaj ĝesinuloj anoncis sin al kurso.

Wiesdorf (Germ.). En novembro de kursoj komenciĝis en la meza lernejo por knaboj kaj knabinoj. 22 lernantoj de la 1-a kaj 2-a klasoj estas instruataj de s-o Glütges.

Polujo.

Boryslav (Pol.). Gimnaziano s-o Ratiner Marek fondis laŭ permeso de gimn. direktoro s-o Gersman gimn. esp. grupon kaj komencis la 27. 11. kurson kun 13 p.; ĉiuj aliĝis al UEA. Adreso: Gimnazia Esp. Grupo, Boryslav, Pol.

Rumanujo.

Arad (Banato). Nova esp. kurso okazas en la ŝtata mezlernejo „Josif Vulcan“.

Bukureŝti. En Normala Lernejo „Elena Doamna“ (preparo de instruistino) komenciĝis kurso de Esp., deviga por la superaj klasoj, fakultativa por la ceteraj. La direktorio de la instituto estas s-ino Isabela Sadoveanu, studenta jam en la Instituto J. J. Rousseau en Ĝenève, ĉe Prof. Bovei. La kurson gvidas s-o Henriko Fischer, ĉiun ĵaŭdon.

Roman. Grupo de studentoj en la Agrikultura Lernejo lernas Esp.

Esperanta etimologio.

Esp. prefiksoj kaj sufixoj en angla lingvo.

Dis discord (malakordo), discomfort (malkomforto), dispel (forpeli), disseminate (dissemi), dissemble (ŝajnigi), discrepancy (diferenco), dissociation (disigo), distemper (malsano de bestoj), distribute (distribui), disconnect (disligi).

Ek exclaim (ekkrii), explode.

Eks exsident, exminister.

Mal malign (kontraŭa), malignant (malbonega), malevolent (malbonvolema), malediction (malbeno), malefactor (malbonfaranto).

Re regain (rehavi), repel (repeli), recognize (rekonii), renovate (renovigi) receive (ricevi).

An Christian, Italian, pagan, politician, electrician, partisan.

Ar Library (libraro aŭ biblioteko), herbarium (sekigita kreskajaro), seminary (kolegio), gregarious (arema).

Ebl agreeable (konsentemebla), portable, come-at-able (trovebla), get-at-able (trovebla), workable (laborebla aŭ farebla), legible (legebla), imperishable (neperebla), insuperable (nevenkebla).

Ec Finesse (leriteco), powress (poveco), duress (streĉeco, enkarcereco), richness (riĉeco), alertness (vigleco), justice (justeco).

Eg megalomania, megaphone, megalosaurus.

Ej (angle y) study (studejo), laundry (lavejo), entry (enirejo), pantry (mangilaro), scullery (lavejo).

Er era (ero da tempo).

Estr magistrate.

Et maisonette (dometo), cygnet (cignido), epaulette (ŝultromano), rozette (rozsimila ornamo), puppet (figureto), mignonette (karulino, flornomo).

Id Leonidas (stelaro), chrysalides (krizalido), chloride, oxide.

Ig eggon (igi).

Il utensil (uzebla ilo).

In Czarina, heroine, Geraldine, Caroline.

Isi telegraphist, machinist, dentist, typist, chemist, florist.

Uj Britannia (elp. Britanjo), Pennsylvania, Caedonia, Hibernia.

Um Umpteen, umpteenth (nedecida nombro).

Ism atheism, buddhism, capitalism, pacifism, commercialism, communism, protestantism.

E. L. Osmond, London.

Negoca informo.

Al la hodiaŭa numero estas aldonita prospektado de „Esperantista Voĉo“ en Jaslo (Polujo), kiun ni rekomendas al la atento de niaj legantoj.

Kio estas S.A.T.

S.A.T. estas organizaĵo celanta meti Esp. je la servo de la proletaro tiumonda.

S.A.T. estas perserantaĵo aparato neniel politika.

S.A.T. kvankam utilcela, laboristoserva, estas samtempe alideala: ĉi celas krei ĉi siaj membroj sennacian spiritoŝtaton.

Kiajn organojn havas S.A.T. por plenumi tian taskon?

S.A.T. eldonas por plenumi tian taskon semajnan revuon, „Sennaciano“.

(Redakcio: 34 Bould. Beaumarchais, Paris XI; Administracio Colmar, Lill, Leipzig-Stettin, Germanujo.)

S.A.T. eldonas per sia Eldonkonferenco gravajn verkojn el la „Faislo“ de Goethe kaj „Eklumon“ de Abismoon de H. Barbuse estas jam aperintaj.

S.A.T. eldonas Jarlibron, enlenanta la adresojn de sia membroj, statistikon pri la laborista movado en la mondo kaj plej diversajn sciindaĵojn.

Kion jam faris S.A.T.?

S.A.T. okazigis 3 kongresojn, kies lasta estis honore prezidata de la fama scienculo A. Einstein.

S.A.T. vekis ĉe la esp. laboristaro grandan intereson, veran entuziasmon kaj per tio certigas la sukceson de Esp. en proletaj randoj.

S.A.T. estas laŭge enregistrita en Francujo. Detalojn oni petu skribante al la sidejo. Adreso: Sennaciana Asocio Tiumonda, 25 rue Boyer, Paris XX.

Tra la mondo.

Maneskribata internacia rondiranta ĵurnalo. La ĵurnalo estas plej efika rimedo por subteni konstantan intereson al la lingvo en komencantoj, gekursanoj, ĝejnuloj, infanoj. Ankaŭ ĝi estas rekomendata al ĉiu samideano, kiu deziras perfektigi en Esperanto, ankaŭ al skribemuloj, verkistoj, tradukistoj, kiuj ne havas eblon lali vidi siajn artikolojn presitaj. — En ĉiu kajero partoprenas dek samideanoj de malsamaj landoj. — En ĉiu kajero estas problemoj, konkursoj kaj aliaj interesindaĵoj kun multaj valoraj premioj. — Jam en multaj landoj la ĵurnalo havas grandan sukceson! — Partoprenantoj de la ĵurnalo enskribas en kajerojn ricevitajn siajn artikolojn originalajn aŭ tradukitajn, aŭ versaĵojn laŭ sia plaĉo kaj elekto, faras notojn kaj korektojn en artikoloj jam enskribitaj kaj cet. — Abonjaro komenciĝas de kia ajn dato. — Jara kofizaĵo estas 1 amerika dolaro. — Gekursanoj, anoj de esp. grupoj, familianoj kaj cet., aliĝante ope — pagas 1 amer. dolaron + 0.20 de dolaro por ĉiu plua partoprenanto. — La kofizaĵoj oni sendu en leteroj rekomenditaj (en amer. dolaroj aŭ en bankbiletoj de sia lando laŭ taga kurzo de amer. dolaro) al la administranto de la ĵurnalo: S-o F. Krämer, Lehrer, Annaberg, Erzgeb., Germanujo. — Pluaj detaloj estas riceveblaj de la administranto kontraŭ unu respondkuponon. — Detala regularo por partoprenantoj estas en ĉiu kajero de la ĵurnalo.

Anoncetoj.

Anoncetoj (nur akceptataj por minimumo du sinsekvalaj enpresoj) kostas po du enpresoj kaj po 30 vortoj egalvaloron de 1.80 sv. fr. — Anoncetoj pri korespondaj kaj interŝanĝoj kostas po du enpresoj kaj po 15 vortoj (krom unu adreso) egalvaloron de 1.20 sv. fr. — Anoncetoj pri esperantista vivo (naskigo, fianĉigo, edziĝo, morto, okazintaĵo, gravaĵo, kunveno, parolado, festoj k. a.) estas senpagaj (unufolia enpresoj). — Anoncetoj devas alveni 8 tagojn antaŭ aperado.

FIANCIGO. Belga s-ano Lino Raphaelle de Cock en Hoboken-Antwerpen kaj kataluna s-ano Antoni Valls en Ripollat Barcelona gefianĉiĝis. [2]

KIU VOLAS ELDONI la plej bonan verkon de Rabindranath Tagore (La ĝardenisto) tradukitan de mi kun la permeso de „L' aŭtoro“? Estas vera domage, ke tia literatura perlo devas kŭi manuskripte jam du jarojn kaj ne povas trovi eldoniston. — Edvardo Wiesenfeld, L. K., Varsovio, Polaio, Biela 5. [1]

RADIO-TELEGRAFO! POŝTO! Mi deziras interŝanĝi suspekcin il. PK (bfl.) kun eksterlandanoj. Speciale mi ŝatas PK, kiu prezentas poŝto-, telegrafo- aŭ radio-oficejojn interne aŭ ekstere. E. Kind, telegrafa inspektoro, Del. de UEA, Euskirchen, Oststr. 28/II Germanujo. [1]

HELPU! BONKORULOJ! Mi havas en manuskripto grandan originalan romanon „S-o titolo“, kiu m. n. estas malklare al ĉiu, kiu helpas al mi mone daŭrigi edukadon de miaj infanoj en la urbo, Skribu al J. Sirjaev, Baklanka, g. de Vologda, Rusujo. [4]

GRAVA! Por atingi la enkondukon de l' Esperanto en la ĉi tieajn lernejojn kaj por trovi al la ĉi tiea publiko kaj urbestro la disvastigon kaj uzon de nia lingvo, ni intencas aranĝi dum marto kiel eble plej grandan esperantan ekspozicion kaj ni urĝe kaj korege petas la internacian samideanaron sendi al ni kiel eble plej multajn esperantaĵojn aŭ il. PK (bfl.) el ĉiuj partoj de la mondo. Ni kvintancos ĉiun sendaĵon per il. PK, se la sendinto deziras l' Esperanto-Grupo „Obŝtine antaŭen“, Euskirchen. Prez.: E. Kind, del. UEA, Euskirchen, Oststr. 28-II Germanujo. [1]

SIAN ESP. BIBLIOTEKON (tre maloftaj libroj kaj gazetoj grandpartiaj binditaj) vendas kaj nomaron nur al serioza, aĉetemuloj sendas: Iv. Krestanoff, en Pirdop, apud Sofia, Bulgario. [1]

DANA OFICISTO deziras postenojn kiel helpanto en io banka, komerca aŭ teknika branĉo; scias la skandinavian, germanan, anglan kaj internacian lingvon. Deziras iri al Francujo, Belgio, Holando, Ĉeĥoslovakio aŭ volonte al Svedujo. Ne postulas altan salajron. Ĉu estas veraj esperantistoj, kiuj legas la anoncon? Donu apogon al vera modesta samideano. Volonte li instruos Esperanton al la familianoj. Skribu al l' Esperanto grupo, delegitino de UEA, Grenaa, Danlando. [1]

Korespondaj kaj interŝanĝoj.

Johano Vincez, Szombathely, Ujvilag uca 21, Hungarujo, PK, L kun ĉiuj landoj. [2]

Fraŭlo, poŝtofiscisto, 21 jara, deziras interŝanĝi per il. PK kaj L kun gesamideanoj. Bonvolu skribi, nepra respondo! Latvio, Rujene, Pasta Kantori, Jaunbrat. [2]

S-o F. Junge, Paralestr. 28, kaj s-o D. Daliwig, Castropstrasse 258, Bochum, Germanujo, deziras interŝanĝi PK kaj PM kun ĉiuj landoj eventuale ankaŭ kontraŭ papermono. [2]

Studento A. Ozols, Riga, Latvio, Dzirnavu iela 70, dz. 5, studento societo „Patria“, deziras korespondi kaj interŝanĝi il. PK kun junaj esperantistinoj ĉiulanda. [2]

Esperantisto-Poŝto George Deškin, Moskva, Rusujo, sciigas al ĉiuj amikoj de Esperanto, ke lia pli maljuna frato, blindiginta majstro Nikolaj Deškin (Wilno, Polujo, ul. Soltanska 26) kun sia malsana edzino kaj seĉpara filineto suferas grandan mizeron. [2]

Deziras interŝanĝi poŝtkartojn pri politika kaj sociala problemoj. Otto Lierssen, Gelsenkirchen, Essenerstr. 4 Germanujo. [2]

Joŝefo Benkő, Szombathely, Köröendi uca 19, Hungarujo PK, L precipe kun fraŭlino. [2]

S-o Béla Juki, Budapest X, Hölgy-u 48, deziras korespondi per il. PK kun eksterultrapanoj kaj kun ĉiulandaj fraŭlinoj. Konstante respondos. [2]

Ing. s-o Gino Bracci, Via Vicenza 56, Roma 21, deziras tiumondajn fotografaĵojn de montoj. Li certe resendos fotografaĵojn kiajn oni deziras. [2]

Krisnaska deziro. Dezirante pligrandigi mian kolekton de il. PK (speciale urbiindaj) mi sendos mian karten de Polujo al ĉiu, de kiu mi ricevas karten (bfl.). S-o Johano Datto, Mickiewicz 46, Katowice — Zaleze, Polujo. [2]

Mi deziras korespondi kun la tiumonda „Boy Scouts“ organizacio kaj precipe interŝanĝi fotografaĵojn el ilia vivo. Sendu kaj skribu al Stanimir Popadić, skoltmastro, Siari Bečel, Jugoslavio. [1]

S-o Kaizo Fukuta, Yekusen, Tojima, Japanujo, deziras interŝanĝi PK il. PM tra la mondo. Preferas kun Ameriko, Afriko, Turkujo, Kubo, Grekujo. [1]